

DIA REGNO DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • (824) 5, septembro — oktobro 2000

DIA REGNO
ISSN 0167-9554



*Parto de la kongresanaro sur la ŝtuparo antaŭ la kongresejo
(fotis Rie VAN DER KOOLL-WAAL)*

KONGRESAJ RAPORTOJ
EKUMENISMO: DISKUTO PRI
DOMINUS IESUS

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi
la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerck
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€ 15,- ☉ Membro-subtenanto € 22,- ☉ Nura
abono: pagante rekte al KELI € 12,-; pagante
al Libroservo € 14,-. Monsendoj de okcidentaj
monbiletoj per registrita letero al la kasisto de
KELI ☉ Se estas en via lando UEA-poŝtĝironto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al
UEA por konto **kelk-p** de KELI ☉Nederlanda
poŝtĝironto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340, Nouaillé-
Maupertuis, Francio; ☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altem.com.

Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!

Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reprezo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo „HEJME” Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

p. 3 Interreta diskuto pri 'Dominus Iesus'

Por pli bone kompreni pri kio temas.

p. 10 Malagrablajoj en eklezia Nederlando, kaj aliloke...

Kiamaniere evoluigi kaj ne evoluigi
ekumenismon.

p. 13 Eŭropa Ekumena Renkontiĝo de 2001 en Strasburgo

p. 14 Mesaĝo de elektito

La nova prezidanto de KELI sin prezentas.

p. 17 Impresoj de la 50-a KELI-kongreso

Vi ne ĉeestis? Do, legu!

p. 19 Protokolo de la KELI-jarkunveno

Kio estis diskutata kaj decidita (ata/ita?)

p. 22 Opinioj pri recenzo

Pensoj pri ekumenismo, la broŝuro de
SCHÜTTE kaj la recenzo de BERVELING.

p. 24 La plej granda Esperanto-katalogo en la Interreto

kaj multaj aliaj!

Redaktoraĵoj vortoj

Karaj gelegantoj,

Teorie, oni devus trovi ĉi tie tekstojn de
la prelegoj en Janské Lázně. Sed mi ne ĉiujn
ricevis. Kaj krome, iu Mons. RATZINGER perm-
esis al iu redaktoro trovi la okazon plenigi
preskaŭ tutan gazeton pri ekumenismo. Do,
legu, pripensu, parolu pri tio apud vi.

La tekstoj de la kongreso aperos en la postaj
numeroj.

Sed tiu (mal-)ekumena evento estis hazarda
okazo. Mi do atendas pliajn kontribuojn. Por
la venonta numero mi nenion ricevis pri «Vivo
kaj morto».

La sekvantaj temoj planataj estas: por janu-
aro–februaro „nova/malnova” aŭ „moderna/
antikva”, por marto–aprilo „Adoru”.

Ne hezitu sendi eĉ nur dek liniojn.

Kore kaj frate en nia Sinjoro.

Philippe COUSSON

PRI 'DOMINUS IESUS'

sur la listo de IKUE

graco kaj vero konfidita al la Katolika
Eklezio”.

[En la gazetara konfenco kiu prezentis la
Deklaron, P. Angelo AMATO respondis al
demando, ĉu la dokumento ne konsistigas
malhelpon je ekumena kaj inter-religia
dialogo. Li diris, ke rilate al ekumenismo la
dokumento diras nenion novan sed atent-
igas pri kaj ripetas la opinion de la Dua
Vatikana Koncilio pri la afero. Kiam temas
pri inter-religia dialogo, la dokumento
proponas vojon al harmonio, paco kaj
respekto kaj neniel konsistigas interrompon
en tiu dialogo.]

Cristian MOCANU

Jen post multe da tempo mi skribas
al ĉi tiu nia listo (sur la kialoj eble kun
alia okazo). Sur la Dokumento „Solus
Dominus” de la C.D.F. [Kongregacio pri
doktrino de Fido] mi atendas la tekston kiu
verŝajne aperigos ĉe la novaj agentejo Zenit.
Ĝis tiam, laŭ kiu mi aŭdis el RV [Radio
Vatikana], la formuloj de la dokumento
estas nur „sole Kristo estas la savanto
kaj sav-rimedo de ĉiuj”, „la nekristanoj
povas atingi savon pere de speciala graco
de Kristo”, sed „la religioj ne povas esti
egalaj kiel savvojoj”, „la libroj de aliaj
religioj estas valoraj, sed ne inspiritaj fare
de Sankta Spirito” kaj „kvankam ekzistas
ioma komunumo inter la Katolika Eklezio
kaj la aliaj kristanaj Eklezioj aŭ ekleziaj
komunumoj, sole la Katolika Eklezio estas
la Eklezio fondita fare de Jesuo Kristo”.
Ŝajnas al mi ke en ĉi-supraj asertoj tute ne
ekzistas „skandalaj” novaĵoj respektive al
la dokumentoj de la 2a Vatikana Koncilio,
kaj ĝenerale al tio, kiun la Eklezio kredas
kaj atestas.

Philippe COUSSON

Karaj Mike, kaj aliaj gefratoj en Kristo, en viaj citaĵoj (indikitaj kursive) troviĝas certe kelkaj ne akcepteblaj pretendoj de la katolika eklezio.

Mi klarigos.

16. ... *Tial, ĝuste kiel la kapo kaj membroj de vivanta korpo, kvankam ne identaj, estas nedisigeblaj, tiel ankaŭ Kristo kaj la Eklezio povas esti nek konfuzitaj nek apartigitaj, kaj konsistigas ununuran "tutan Kriston". Ĉi tiun saman nedisigeblon ankaŭ esprimas la Nova Testamento per la analogio de la Eklezio kiel la Novedzino de Kristo (kp. 2 Korintanoj 11:2; Efezianoj 5:25-29; Apokalipso 21:2,9) ...*

Pri tio, neniuj problemoj. Sed ni ne parolas pri la sama eklezio. LA Eklezio, estas por ni, protestantoj, la „universala” eklezio, konsistanta el la arigo de la kredantoj, certe ne iu „homa” organizo, kiel iu ajn „eklezio”, nek unu el niaj „eklezioj”, nek la roma.

17. *Tial, ekzistas ununura Eklezio de Kristo, kiu pluvivas en la Katolika Eklezio, estrata de la sekvinto de Petro kaj de la episkopoj en komunio kun li ...*

Ne akceptebla aserto: La ununura Eklezio de Kristo tute ne ekvivalentas al la roma, nek la roma estas la sola pluvivo de ĝi.

Aliflanke, la ekleziaj komunumoj kiuj ne konservis la validan episkopecon kaj la aŭtentikan kaj nemalhaveblan enhavon de la eŭkaristia mistero, ne estas Eklezioj en la konvena senco; tamen baptitoj de ĉi tiuj komunumoj estas, per bapto, enkadrigitaj en Kristo kaj tiel estas en ia komunio, kvankam neperfekta, kun la Eklezio.

Kion signifas tiuj same ne-akcepteblaj asertoj: valida episkopeco, aŭtentika eŭkaristio? Mi povas facile akcepti ke la roma katolika eklezio funkcias kun episkopeco, kiu devas havi por si kelkajn trajtojn. Mi facile povas akcepti ke la romkatolika eklezio havas propran komprenon de la

eŭkaristio. Sed mi ne povas akcepti ke la roma katolika eklezio konsideras tiujn elementojn kiel nepraj por kristanismo, por „valida” kristanismo. Neniam.

„Tial, kvankam ni kredas, ke ili suferas de mankoj, la apartigitaj Eklezioj kaj komunumoj ĉi tiuj tute ne estas senigitaj de signifo kaj graveco en la mistero de elsaviĝo. Ĉar la Spirito de Kristo ne sin detenis uzi ilin kiel rimedojn de elsaviĝo kiuj ricevas sian efikecon de la pleno da graco kaj vero konfidita al la Katolika Eklezio”.

La aliaj kristanaj eklezioj ne suferas de mankoj pli ol la roma eklezio. Ĉiuj eklezioj estas reformendaj. La vero ne estis konfidita al la sola roma eklezio. Tiuj pretendoj estas preskaŭ ne elteneblaj. Tiu teksto de RATZINGER aperas kiel seniluziigo, post la averto de la indulgencoj pro la jubilea jaro (malbona rememoraĵo pri iu TETZEL).

Andrzej MARSZAŁKOWSKI

Pri tio, neniuj problemoj. Sed ni ne parolas pri la sama eklezio. LA Eklezio, estas por ni, protestantoj, la „universala” eklezio, konsistanta el la arigo de la kredantoj, certe ne iu „homa” organizo, kiel iu ajn „eklezio”, nek unu el niaj „eklezioj”, nek la roma.

Katolika (greka vorto) signifas ĝuste „universala”.

17. *Tial, ekzistas ununura Eklezio de Kristo, kiu pluvivas en la Katolika Eklezio, estrata de la sekvinto de Petro kaj de la episkopoj en komunio kun li ...*

Ne akceptebla aserto: La ununura Eklezio de Kristo tute ne ekvivalentas al la roma, nek la roma estas la sola pluvivo de ĝi.

Kial? Vi tute ne pravas. Pripensu denove: Eklezio de Kristo estas ununura — Vi tion certe konsentas. Due: la ununura Eklezio de Kristo pluvivas en la Katolika Eklezio — eble ne? Tamen tiu dua aserto

ne diras, ke la Eklezio de Kristo ne vivas en aliaj eklezioj ol la katolika. La Vatikana dokumento ne diras, ke la Katolika Eklezio estas la ununura, nur ke la Eklezio de Kristo estas ununura. La Eklezio de Kristo havas alian, probable pli vastan sencon ol la Katolika Eklezio. Sence estus la saman nocion nomi per du esprimoj. Tio estas du apartaj nocioj.

Aliflanke, la ekleziaj komunumoj kiuj ne konservis la validan episkopecon kaj la aŭtentikan kaj nemalhaveblan enhavon de la eŭkaristia mistero, ne estas Eklezioj en la konvena senco; tamen baptitoj de ĉi tiuj komunumoj estas, per bapto, enkadrigitaj en Kristo kaj tiel estas en ia komunio, kvankam neperfekta, kun la Eklezio.

Neperfekta traduko, precipe: „en la konvena senco”.

Kion signifas tiuj same ne-akcepteblaj asertoj: valida episkopeco, aŭtentika eŭkaristio?

Mi ne kredas, ke Vi ne scias. Vi nur retorike demandas...

Mi povas facile akcepti ke la roma katolika eklezio funkcias kun episkopeco, kiu devas havi por si kelkajn trajtojn. Ni facile povas akcepti ke la romkatolika eklezio havas propran komprenon de la eŭkaristio. Sed ne ne povas akcepti ke la roma katolika eklezio konsideras tiujn elementojn kiel nepraj por kristanismo, por „valida” kristanismo. Neniam.

Nu, ne ĉiuj protestantaj eklezioj apogus Vian aserton. Estas ja episkopalaj eklezioj, ekzemple en la sveda eklezio, sed ne nur tie...

Tial, kvankam ni kredas, ke ili suferas de mankoj, la apartigitaj Eklezioj kaj komunumoj ĉi tiuj tute ne estas senigitaj de signifo kaj graveco en la mistero de elsaviĝo. Ĉar la Spirito de Kristo ne sin detenis uzi ilin kiel rimedojn de elsaviĝo kiuj ricevas sian efikecon de la pleno da graco kaj vero konfidita al la Katolika Eklezio?

Nu, la dokumento de Vatikano diras, ke aliaj eklezioj „tute ne estas senigitaj de signifo”, sed „ne plene”. Tio tute ne estas la samo.

La aliaj kristanaj eklezioj ne suferas de mankoj pli ol la roma eklezio. Ĉiuj eklezioj estas reformendaj.

Ankaŭ la Katolika Eklezio, kion en la seminarioj lernas ĉiu estonta pastro kaj dum la katekizado ĉiu lernanto.

La vero ne estis konfidita al la sola roma eklezio. Tiuj pretendoj estas preskaŭ ne elteneblaj.

Por mi ankaŭ, sed pro alia kaŭzo. Nome, la vero estis konfidita al ĉiuj eklezioj fonditaj de Apostoloj: do la Jeruzalema Eklezio (nuna islamo), Efeza Eklezio, Armena Eklezio, Etiopia Eklezio, Hinda Eklezio, eble ankaŭ aliaj nune ne konataj.

Tiu teksto de RATZINGER aperas kiel seniluziigo, post la averto de la indulgencoj pro la jubilea jaro (malbona rememoraĵo pri iu TETZEL).

Mi proponas, ke ni okazigu interkonfesiajn diskutojn surbaze de tiu dokumento kaj aliaj pli fruaj. Do, temaro por daŭra ekumena kunlaboro de KELI kaj IKUE.

Mike LEON

Elkoran dankon Philippe pro la pripensiga respondo.

Mi scias el la gazetaraj raportoj ke la deklaro 'Dominus Iesus' ofendis multajn kristanojn. Mi konfesas, ke mi ne komprenas kial estis necese eldoni ĝin en la jubilea jaro. La 2000-a datreveno de la naskiĝo de nia Savinto devus esti seninterrompa festo de unueco inter kristanoj, sed nun amareco estas enmetita. La verkintoj de la deklaro insistas ke ĝi „diras nenion novan”. Tiukaze, kial ĝi ne povis atendi unu-du jarojn?

Pri tio, neniuj problemoj. Sed ni ne parolas pri la sama eklezio. LA Eklezio, estas por ni, protestantoj, la „universala” eklezio,

konsistanta el la arigo de la kredantoj, certe ne iu „homa” organizo, kiel iu ajn „eklezio”, nek unu el niaj „eklezioj”, nek la roma.

Ĉi tiu bone ilustras la frustraciojn de ekumena dialogo. Kaj katolikoj kaj protestantoj respektegas la Sanktajn Skribojn kiel la Vorton de Dio kaj plejparte ni legas similajn tradukojn. Sed ni ofte komprenas la signifon de la tekstoj tute malsame.

Jen plua ekzemplo el intersaĝo kiun mi havis en publika interreta forumo pri la temo de infaneta bapto. Mi skribis: „*La antikvan praktikon de infaneta bapto jam subtenas la Nova Testamento kiu sciigas, ke tutaj familioj estis baptitaj (1 Korintanoj 1:16; Agoj 16:15 k 33)*”. La respondo: „*Jes, sed ĝi ne diras „tutaj familioj kune kun infanetoj...”*”

17. *Tial, ekzistas unumura Eklezio de Kristo, kiu pluvivas en la Katolika Eklezio, estrata de la sekvinto de Petro kaj de la episkopoj en komunio kun li ...*

Ne akceptebla aserto: La unumura Eklezio ne Kristo tute ne ekvivalentas al la roma, nek la roma estas la sola pluvivo de ĝi.

Mi ne kredas ke ia ajn interkonsento eblas inter ni pri ĉi tiuj kaj aliaj fundamentaj demandoj. Klare, nin ĉiujn influas multe pli ol la teksto de la Biblio. Ni interpretas ĝin laŭ la lumo de historiaj polemikoj, kompleksaj teologioj kaj la influoj de niaj familianoj, amikoj kaj fidkomunumoj. Ni povas nur konsenti malkonsente.

Aliflanke, la ekleziaj komunumoj kiuj ne konservis la validan episkopecon kaj la aŭtentikan kaj nemalhaveblan enhavon de la eŭkaristia mistero, ne estas Eklezioj en la konvena senco; tamen baptitoj de ĉi tiuj komunumoj estas, per bapto, enkadrigitaj en Kristo kaj tiel estas en ia komunio, kvankam neperfekta, kun la Eklezio.

Kion signifas tiuj same ne-akcepteblaj asertoj: valida episkopeco, aŭtentika eŭkaristio? Mi povas facile akcepti ke

la roma katolika eklezio funkcias kun episkopeco, kiu devas havi por si kelkajn trajtojn. Ni facile povas akcepti ke la rom-katolika eklezio havas propran komprenon de la eŭkaristio. Sed ni ne povas akcepti ke la roma katolika eklezio konsideras tiujn elementojn kiel nepraj por kristanismo, por „valida” kristanismo. Neniam.

Jes, tiel ankaŭ mi komprenas. La naturo de la Eŭkaristio estas home malforprenebla barilo inter ni kaj la plejmulto da protestantaj kristanoj.

Vi demandis: kion signifas „aŭtentika Eŭkaristio”? Ĝi signifas tion ĉi (el 1 Korintanoj 11):

„Ĉar mi ricevis de la Sinjoro tion, kion mi ankaŭ transdonis al vi, ke la Sinjoro Jesuo en la nokto, en kiu li estis perfidata, prenis panon; kaj doninte dankon, li dispecigis ĝin, kaj diris: Ĉi tio estas mia korpo, kiu estas por vi; ĉi tion faru por memorigo pri mi. Tiel same ankaŭ la kalikon post la vespermanĝo, dirante: Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia sango; ĉi tion faru ĉiufoje, kiam vi trinkos, por memorigo pri mi. Ĉar ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis li venos. Tial ĉiu, kiu neinde manĝos la panon aŭ trinkos la kalikon de la Sinjoro, kulpiĝos pri la korpo kaj la sango de la Sinjoro. Sed oni sin provu, kaj tiele manĝu el la pano kaj trinku el la kaliko”.

La Sinjoro instruis tiun doktrinon al la apostoloj, kiuj instruis ĝin al la postaj sekvantoj de Kristo, kiuj konservis ĝin dum jarcentoj kaj instruis ĝin al ni. Eŭkaristio — la korpo kaj sango de Kristo, komunio (1 Ko 10:16); la tablo de la Sinjoro (1 Ko 10:21); la vespermanĝo de la Sinjoro (1 Ko 11:20); la dispecigo de pano (Agoj 2:42) — troviĝas en la koro kaj animo de la antikvaj Eklezioj centrataj je Romo kaj Konstantinopolo. Sen ĝi ni ne estus tiaj, kiaj ni estas. Ĉi tiu doktrino difinas

nin kaj ilustras la grandegan abismon kiu malfermiĝis en la Kristanaro je la Reformacio.

„Tial, kvankam ni kredas, ke ili suferas de mankoj, la apartigitaj Eklezioj kaj komunumoj ĉi tiaj tute ne estas senigitaj de signifo kaj graveco en la mistero de elsaviĝo. Ĉar la Spirito de Kristo ne sin detenis uzi ilin kiel rimedojn de elsaviĝo kiuj ricevas sian efikecon de la pleno da graco kaj vero konfidita al la Katolika Eklezio”.

La aliaj kristanaj eklezioj ne suferas de mankoj pli ol la roma eklezio. Ĉiuj eklezioj estas reformendaj. La vero ne estis konfidita al la sola roma eklezio. Tiuj pretendoj estas preskau ne elteneblaj.

Feliĉe ni ne pretendas ke ĝi estas. Eĉ ĉi tiu dokumento agnoskas, ke aliaj kristanoj trovas elsaviĝon en siaj Eklezioj. Kaj vi tute pravas: tiom, kiom la Eklezio estas homa institucio, ĝi estas plu reformenda.

Cristian MOCANU

Kara Philippe, karaj gelistanoj,

Unue, mi dankas al Mike, kiu denove havigis al nia listo kompletajn citaĵojn el CDF-dokumentoj.

Due, mi tute povas kompreni ke al niaj protestantaj gefratoj dolore sentas la vundojn de la pasinteco, kaj kiel ni, suferas pro neatingo de la unueco inter la kristanoj.

Tamen, unu fakton ni devas klarigi: dokumento de la CDF estas destinata precipe al la katolika Eklezio, por klarigi kiel ĝi (ni) komprenas la kred-elementojn. Tiuj dokumentoj ne intencas proponi al nekatolikoj kredi la samon.

Mi ŝatus klarigi — tiom kiom mi povas — nur la punkto pri la episkopeco, sakramentoj ktp. *Por la katolikoj* gravas la apostola sinsekvo, t.e. la „linio” kiun oni povas streki inter la apostoloj kiuj designis episkopojn kiuj ankaŭ nomis episkopojn ktp., ĝis la nuntempaj episkopoj. Pro tio,

la Katolika eklezio agnoskas la ortodoksajn Ekleziojn kiel Ekleziojn kaj same validas pri la aliaj orientaj eklezioj. Ili havas apostolan sinsekvon; la fakto ke al ili mankas la komunumo kun Romo ne interrompis tion. Eĉ la anglikana/episkopa Eklezio, komence havas apostolan sinsekvon ĉar la unuaj episkopoj de tiu komunumo estis konsekritaj de episkopoj kun apostola sinsekvo, sed poste kiam aliaj personoj — pastoroj kaj se mi ne eraras ankaŭ reĝoj — konsekris episkopojn, oni rompintis tiun apostolan sinsekvon — almenaŭ laŭ katolika vidpunkto. Same validas pro la aliaj komunumoj kiuj devenas el la Reformacio — ĉu havantaj, ĉu ne havantaj episkopojn. Pro tio la katolika parto distingas inter Eklezioj kaj ekleziaj komunumoj.

Cetero, ni kiel katolikoj kredas ke la sep sakramentoj estas tre forta helpo por atingi savon/sanktecon. La grado en kiu oni povus diri ke ili estas nepraj varias: ekz-e la sakramentoj de edziĝo kaj de pastra ordino tute ne estas nepraj en la senco de la latina „*sine qua non*”. Sed la sakramentoj estas ĉiuokaze laŭ ni grava helpo. Tamen, mi ripetas: tiu estas katolika interpretado, kaj estas tasko de ekumenaj teologoj — kun la helpo de la Sankta Spirito — pristudi ĉiun interpretadon por fine atingi la komunan. Nek Kardinalo RATZINGER, nek la Papo, nek alia grava persono en la katolika Eklezio intencas *devigi* al la protestantoj, ortodoksoj, islamanoj, hinduoj, kion kredi. Ili simple asertas kaj klarigas, kion ni kredas. En neniuj dialogo, ĉu ekumena, ĉu interreligia, ĉu politika, oni ne sukcesus se oni ne eniras tion kun klare definitaj starpunktoj.

Cristian MOCANU

Mi tute kunsentas kun Andrzej, kaj ĉi tie mi ŝatus nur fari etan komenton sur la plej nova mesaĝo de Mike.

Nome, li parolis pri la maloportuneco

de la aperigo de „*Solus Christus*” en la jubilea jaro. Mi tute konsentas, sed la Kurio ĉiam konsideras la aferojn „*sub la aspekto de la eterneco*”. Tiel ne ĉiam oni elektis „oportunan” momenton. Cetere, tiu momento estas oportuna el almenaŭ unu vidpunkto, nome la kreskinda malklareco en la menso de multaj katolikoj riale al interreligia dialogo. Ĉu en landoj kiel Hindio, ĉu en landoj kiel Britio, Usono, Germanio oni havas tiun malklarecon, kaj kiel la okazo de interreligiaj renkontiĝoj/dialogoj aperas ĉiutage, la danĝero de sinkretismo kaj relativismo estas vera kaj granda. Tamen, eble ne estis bone kunmencii la aliajn kristanojn, des pli, ke ili ankaŭ konsideras Kriston kiel ununuran Savanton.

Ulrich MATTHIAS

Karaj Filipino, Andrzej kaj aliaj listanoj, ŝajnas, al mi, ke en via diskuto pri la tezo

17. *Tial, ekzistas ununura Eklezio de Kristo, kiu pluvivas en la Katolika Eklezio, estrata de la sekvinto de Petro kaj de la episkopoj en komunio kun li...*

la vero troviĝas ie en la mezo. Tiu ĉi frazo fakte ne originas de RATZINGER, sed de la Dua Vatikana Koncilio (*Lumen Gentium* 8,2). En la esperanta traduko mi tamen preferus diri „*subsistas*” anstataŭ „*pluvivas*”, ĉar ŝajnas al mi, ke la Koncilio intence uzis tian malklaran vortigon por tiel tikla afero. Supozeble la vorto „*subsistit / subsistiert / subsists...*”, kiujn oni uzas ĉi-rilate en la latina, germana, angla ktp. en neniuj lingvoj havas vere precizan signifon. Ĝi povus signifi i.a. „*pluvivas*”, „*ĉeestas*” aŭ „*estas realigita*”.

La Dua Vatikana Koncilio malakceptis la originan proponon „*...la ununura Eklezio de Kristo (...)* kiu estas la Katolika Eklezio” kaj same la vortigojn „*...kiu konsistas en la Katolika Eklezio*” aŭ „*...kiu plene subsistas en la Katolika Eklezio*”. Oni aldonis, ke tio „*ne ekskludas, ke oni trovas ekster*

ĝia strukturo multflankajn elementojn de sanktigo kaj vero”.

Sed RATZINGER nun aldonis ankaŭ la „*klarigon*”, ke la „*Eklezio de Kristo malgraŭ la skismoj de la kredantoj plene pluekzistas nur en la Katolika Eklezio*”. Mi pensas, ke tia eldiro estas regreso kompare kun la Dua Vatikana Koncilio.

Malgraŭ tio, mi certgrade povas respekti la vortojn de RATZINGER. Ja ankaŭ mi mem toleras, se ano de alia konfesio aŭ religio trovas sian propran kredon pli vera ol la mian, kaj trovas tute honeste, se li malferme diras tion anstataŭ ŝajnigi sin neŭtrala. Sed povas esti, ke la vorto de RATZINGER tamen damaĝas al eklezianismo. Ili ne devas malhelpi la kunlaboron, sed povas esti obstaklo por la fina unuiĝo de la kristanoj, kiu laŭ mi estas tre dezirinda.

Gerrit BERVELING

A „16... *Tial, ĝuste kiel la kapo kaj membroj de vivanta korpo, kvankam ne identaj, estas nedisigeblaj, tiel ankaŭ Kristo kaj la Eklezio povas esti nek konfuzitaj nek apartigitaj, kaj konsistigas ununuran „tutan Kriston”. Ĉi tiun saman nedisigeblon ankaŭ esprimas la Nova Testamento per la analogio de la Eklezio kiel la Novedzino de Kristo (kp. 2 Korintanoj 11:2; Efezianoj 5:25-29; Revelacio 21:2,9)...*”

Pri tio, neniuj problemoj. Sed ni ne parolas pri la sama eklezio. LA Eklezio, estas por ni, protestantoj, la „universala” eklezio, konsistanta el la arigo de la kredantoj, certe ne iu „homa” organizo, kiel iu ajn „eklezio”, nek unu el niaj „eklezioj”, nek la roma.

„17. *Tial, ekzistas ununura Eklezio de Kristo, kiu pluvivas en la Katolika Eklezio, estrata de la sekvinto de Petro kaj de la episkopoj en komunio kun li...*”

Ne akceptebla aserto: La ununura Eklezio ne Kristo tute ne ekvivalentas al la roma, nek la roma estas la sola pluvivo de ĝi.

B „*Aliflanke, la ekleziaj komunumoj kiuj ne konservis la validan episkopecon kaj la aŭtentikan kaj nemalhaveblan enhavon de la eŭkaristia mistero, ne estas Eklezioj en la konvena senco; tamen baptitoj de ĉi tiuj komunumoj estas, per bapto, enkadrigitaj en Kristo kaj tiel estas en ia komunio, kvankam neperfekta, kun la Eklezio*”.

Enestas miaopinie grava — ankaŭ rezonada — eraro inter la citaĵoj A kaj B: laŭ A, kiu deiras de metaforo trovebla en la leteraro de Paŭlo kaj ties skolo (do en la Nova Testamento mem; t. e. por kristanoj de kiu ajn tradicio nepre tre centra teksto, minimume konsiderenda serioze), „*Kristo kaj la Eklezio povas esti nek konfuzitaj nek apartigitaj, kaj konsistigas ununuran tutan Kriston*”. Kaj ĝuste tio estas, kion en protestanta tradicio oni konsideras „*la universala Eklezio de Kristo*”, kiu — kiel tute prave atentigas amiko COUSSON — konsistas „*el la arigo de la [= ĉiuj! jen kial gravas foje nia artikolo!] kredantoj,*

certe ne iu „homa” organizo, kiel iu ajn „eklezio”, nek unu el niaj „eklezioj”, nek la roma”. Aliflanke ni havas tekston B, kiu deiras de (romkatolika) eklezi-jura eraro, kun ĝia pretendata graveco ĉu oni jes aŭ ne konservis ilian t. n. „validan episkopecon kaj la aŭtentikan kaj nemalhaveblan enhavon de la eŭkaristia mistero” (kaj per tio teksto B deiras ne de la origino kristanisma sed de iu ties evolua stadio pliposta!), sed la sama teksto B samtempe asertas ke la „*baptitoj de ĉi tiuj komunumoj*” [= la ceteraj eklezioj krom la romkatolika] *estas, per <la> bapto, enkadrigitaj en Kristo kaj tiel estas en ia komunio, kvankam neperfekta, kun la Eklezio*”. Kaj se oni nun klare komparas tekston A kaj B, oni konstata ke ĉe A (la laŭ-biblia, oni „*ne apartigu Kriston kaj Eklezion*” kaj ke tie „*ĉiuj kristanoj estas membroj de unu Kristo*”, dum ĉe B oni konstata ke „*ĉiuj baptitoj ja estas ligitaj al Kristo, sed ŝajne ne ĉiuj al la Eklezio*”, konsekvence, ĉe

Deklaracio '**Dominus Iesus**' pri la unueco kaj sava universaleco de Jesuo Kristo kaj la Eklezio

Plena teksto en la lingvoj:

angla

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_en.html

franca

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_fr.html

germana

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_ge.html

itala

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_it.html

kastilia

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_sp.html

latina

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_lt.html

portugala

http://www.vatican.va/roman_curia/congregations/cfaith/documents/rc_con_cfaith_doc_20000806_dominus-iesus_po.html

MALAGRABLAĴOJ EN EKLEZIA NEDERLANDO, KAJ ALILOKE...

En *Dia Regno* 822 de majo/junio aperis reago mia al la broŝuro de Heinz SCHÜTTE *Malgranda Ekumena Katekismo / ... ke ĉiuj estu unu ... /* ktp, kiun pro iu miskompreno oni indikis ĉe la tiumonata *Enhavtabelo* kiel 'interpreto de la vortoj de Jesuo'. Al tio mi ricevis kelkajn iom ĉagrenajn reagojn: ŝajne ĉu mia teksto mem, ĉu la mencio 'interpreto de la vortoj de Jesuo', ĉu ambaŭ kune ĉagrenis kelkajn amikojn. Tion mi serioze bedaŭras.

Unuflanke, en la menciita rakonteto mi absolute ne intencis ekzegezi tiujn evangeliajn dirojn, des malpli depreni de l' seriozeco de l' Jesuaj paroloj, nek de la ekumena strebado en si mem. Male, ekumeno havas mian amon tre serioze.

B oni plej emfaze apartigas Kriston kaj Eklezion. Estas la rezulto, ke oni povas konstati, ke teksto **B** (la opinio bazita je plipostaj evoluoj) kontraŭas la originan tezon de teksto **A**.

Gerrit BERVELING

P. S. Ankaŭ historie, la tezoj ĉi-rilataj de la romkatolika tradicia teologio ne estas ĝustaj: oni tie kutime asertas ke ili estas senŝanĝa daŭrigo de la origina eklezio fondita de Jesuo, dum

a) tute ne historie certas ĉu entute Jesuo iam celis fondi eklezion disde judismo;

b) la unua kristana eklezio, tiu de Jerusalema sub Jakobo la frato de Jesuo, kaj ties posteuloj la judkristanismo estis eĉ kondamnitaj kiel 'herezuloj' — do iel ŝiriĝis la 'senŝanĝa daŭrigo' jam tre frue;

c) el la pliposte iom post iom establiĝinta

Mian tekston interalie kaŭzis grava zorgo mia ĝuste *pri* la nuna stato de l' ekumeno. Certe kiom mi perceptas ĝin deapude en nia lando, Nederlando. Kaj foje bedaŭrinde — ankaŭ internacie.

Nialande, antaŭ pluraj jardekoj, grupo da pastoroj de l' nederland-reformacia eklezio (*Nederlands Hervormd*) kaj de la reformita eklezio (*Gereformeerd*) konstatis, ke fundamente ne plu ekzistas seriozaj teologiaj diferencoj inter ambaŭ; tial ili proponis, ke ambaŭ eklezioj kuniĝu en unu reformacia nacie nederlanda 'ekumena' eklezio. Tio fariĝis oficiala projekto de ambaŭ eklezioj kun la nomo 'kune-survoje' (*samen op weg*)... Ambaŭ sinodoj akceptis

eklezio-tradicio restas al ni pluraj tute malsamaj eklezioj, ekzemple la kopta de Etiopio, tiu de Egiptio, k. s.; la ortodoksiaj de Konstantinopolo, k. s. — kaj kiel 'novigo' la eklezio de Romo... Ne estis tute sence, ke foje dum vojaĝo en Greklando mi vidis en lokaj ortodoksiaj eklezioj la alvokon al la papo de Romo Johano Paŭlo II, ke tiu estas invitata „*reiri al la pra eklezio*”... Prefere oni simple lasu ĉiujn pretendojn, konsciante ke laŭ la biblio ni ĉiuj apartenas kune, almenaŭ tiel longe kiel ni parolos pri „*Dio nia Patro kaj Jesuo nia Sinjoro*” (vidu la tekston **A**).

P.P.S. Eble ĉi tie eĉ senchavas, kion diras apokrifaj evangelio — tiu laŭ Maria Magdalena: „*Prefere ni hontu! Ni vestu nin per la perfekta Homo kaj ni plenigu nian taskon, ni prediku la evangelion, neniom limigante nek leĝofarante, krom laŭ kion diris la Savanto*”.

► la intenco-deklaron, instaliĝis grupoj, organizoj, delegitaroj, komisionoj... prepariĝis kaj akceptiĝis proponoj, sugestoj, kontraŭproponoj, revizioj ktp ktp, eĉ skizoj kaj ree novaj skizoj de komuna eklezia leĝaro, ktp... Post jaroj kaj jaroj ankaŭ la nederlanda luterana eklezio decidis aliĝi al la unuigoprocedo... La remonstranta eklezio, kvankam invitata, ne aliĝis [ne povis aliĝi], ĉar ĝi povis aliĝi nur kondiĉe, ke la deklarojn de Dordrecht kontraŭ la remonstrantoj (komence de la 17a jarcento!) ĝi akceptu kiel oficiale akceptatan kredkonfesion, samrange kiel la kredkonfesojn de Niceo kaj Konstantinopolo ktp. (Imagu: la remonstrantoj eĉ ne rekonas iun ajn kredkonfesion kiel devigan — neniam rekonis tiujn kredkonfesojn kiel devigajn — kaj por aliĝi al la unuigoprocedo ni nun akceptu la dekretojn kontraŭ ni kiel kredkonfesion seriozan; tio estus iom skizofrenie!).

Kiel ajn, dum la lastaj dek / dek kvin jaroj, la debatoj, kunsidoj, pledadoj kaj plendadoj ĉirkaŭ la temo 'kune-survoje' [=ek al nova 'ekumena' protestanta eklezio Nederlanda] fariĝis ĉiam pli kaj pli da probleme-akraj, foje eĉ rekte insultaj debatoj: dum pluraj sinodokunsidoj oni proponis, pleje el la rondo ortodokse reformita interne de l' nederland-reformacia eklezio [atentu bone: tio NE estas la reformitoj mem — *tiujn* ili ja konsideras kiel 'fie liberalaj' (mi citas!)], ke jen tiun jen alian profesoron oni kondamnu, eksigu el la profesora posteno; ke jen tiun jen alian pastoron oni eksigu el la pastoreco. Kial? Pro la asertata ne-obeo al la oficiala kredkonfeso. Ĉiam pli interne de l' 'kune-survoje-procedo, la kredkonfeso fariĝas mezurilo por kondamni 'la aliajn'... foje per lavango da ensenditaj leteroj en taggazetoj. La plej fama atakata studento estas WIERSINGA; la plej famaj atakataj [-ita

nepre malsufiĉas: daŭre kaj ripete!] profesoroj estas KUITERT kaj DEN HEYER. Profesoro KUITERT intertempe pensiĝis — kaj plu verkas, ĉiam pli kritikeme koncerne dogmojn kaj precipe koncerne dogmemon — multege pli akre ol mi povas aŭ intencas fari! Li estas profunde vundita de ĉiuj ĉi atakoj. Profesoro DEN HEYER, multe pli juna, post pli ol trijara intereklezia batalado pri tio, ĉu li povos fariĝi 'pastoro en ĝenerala servo' [t.e. sen ligo al loka komunumo sed ja kun la rajto bapti kaj servi la Sinjormanĝon], finfine ĉimonate rezignis pri tio: li eĉ dubas, ĉu estonte li plu pretos prediki en normalaj diservoj.

Kaj vidante ĉirkaŭ mi tiun timigan kreskadon de maltoleremo, ĉe kiu oni daŭre uzas / misuzas la kredkonfesojn kiel armilojn, mi verkis mian averton kontraŭ verkado de nova sed nun ekumena kredkonfeso. Imagu, ke ĝi estos akceptita — kaj ekfunkcios same!

Kromefiko tre malagrabla de la tuto estas ke la aliaj eklezioj nialande jam de jardekoj rimarkas, ke ĉe interekleziaj konsultiĝoj aŭ eĉ ĉe nuraj ekumenaj kunvenoj, la kontribuo *efektiva* de l' nederland-reformaciaj kaj reformitaj rondoj fariĝis minimumaj: ili uzas / bezonas preskaŭ ĉiun sian energion por siaj internaj debatoj kaj kvereloj. Tion dum mia ofitado kiel pastoro en tiaj rondoj mi oftege aŭdis, de romkatolikaj partoprenantoj, de menonitoj, de homoj de l' sav-armeo kaj de aliaj. Estas tre bedaŭrinde, sed ja estas fakto.

Sed nun — kvazaŭ por substreki ke estas io misa en la ekumeno — antaŭ nelonge la eklezio de Romo, per sia deklaro *Dominus Iesus* [se mi la titolon bone parkeras] ripetis sian konvinkon, ke nur Ĝi estas 'la' Eklezio — la orientajn, ortodoksiajn ekleziojn ĝi almenaŭ 'rekonas' kiel ekleziojn en vera senco, sed la anglikanajn kaj la protestantajn ekleziojn ĝi konsideras kiel *kristanajn*

70-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 28a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2001 en Triesto, Italio.

Profitu de la okazo pasigi semajnon en Italio, tuj post la fino de la U.K. en Zagrebo/Kroatio. Temas pri la tradicia renkontiĝo de italaj esperantistoj, kiuj en jaro 2001 devos elekti novan estraron por gvido de la movado en la sekvaj tri jaroj.

La riĉa kongresa programo antaŭvidas prelegojn, esperantologian forumon, ekskursojn kaj urbajn vizitojn kaj ankaŭ kunvenon de Esperanto-rondo de Alp-Adrio.

Pliajn informojn vi trovos ĉe: <http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html>.

Triesta Esperanto-Asocio aparte bonvenigas la neitalajn gesamideanojn, kiuj elektos tiun ĉi aranĝon kiel postkongresa restado en esperantista etoso.

Edvige ACKERMANN
nored@tiscalinet.it
Interredaktore



organizaĵojn, kiuj ne povas havi la nomon 'eklezio'. — Vere, ĉifoje mi rezignas je komentado. Mi ne ŝatas fariĝi malafabla...

Kiel ajn, restas mia konvinko, kaj eĉ pli fortiga, ke estas pli bone ne havi komunajn dogmojn aŭ kredkonfesojn. Ili ja tro facile fariĝas mezuriloj por mezuri la kvaliton de la aliaj! Ili tro facile estas misuzataj...

Mi kredas ke Jesuo nepre ne intencis tian unuecon.

Gerrit BERVELING

53 IKUE KONGRESO

La 53-a IKUE en Rimini partopenas 130 kongresanoj el 15 landoj de Eŭropo kaj Afriko.

Dum la inaŭguro salutis la partoprenantoj la vicsekretario de la Pontifika Konsilio de la laikoj d-ro Guzman CARRIQUIRY.

La diservon en la preĝejo de sanktaj Johano kaj Paŭlo en la kuncelebrado de deko da pastroj prezidis eks. moŝto Johano LOCATELLI, emerito kaj eksa episkopo de Rimini.

Dum la unua tago, okazis du prelegoj: pri konvertiĝo fare de p. KOBOR kaj pri la Sankta Tuko fare de prof. Emmanuela MARINELLI, sindonologo kaj docento ĉe la LUMNSA-universitato de Orvieto.

Ni menciuj, ke en la paroĥejo de p. Duilio MAGNANI kiu gastas ĉi kongreson estas starigita la ekspozicio pri la Sankta Tuko. Esperantistoj povas akiri ankaŭ Esperantlingvan version de la video-bendo pri tiu temo, samkiel aĉeti la libron kun la aldonita traduko al Esperanto (Intersitoj bv. turni vin al p. Duilio MAGNANI).

La hieraŭan tagon, la kongresanoj pasigis en spirito de S-ta Francisko. Oni vizitis Gubbion, Asizon kaj la Verna. En la kapelo de frato Elia diservon prezidis p. Lajos KOBOR kaj kuncelebris p. B. EICHKORN kaj p. ZIELONKA.

Post la diservo Esperantistoj vizitis la tombon kaj la bazilikon de S-ta Francisko. Posttagmeze oni vizitis ankaŭ la bazilikon de Maria de anĝeloj.

La pilgrima tago finiĝis per la preĝo de la parto de vespro en la preĝejo en La Verna.

Hodiaŭ posttagmeze oni vizitos la sanktan Domon en Loreto.

Marija BELOŠEVIĆ
la 5-an de septembro, 2000

EŬROPA EKUMENA RENKONTIĜO DE 2001 EN STRASBURGO (FRANCIO) POR SOLENI LA NOVAN JARMILON

KONFERENZ EUROPÄISCHER KIRCHEN

TTT-paĝoj: <www.cec-kek.org>

Concilium Conferenciarum Episcoporum Europae

TTT-paĝoj: <www.kath.ch/ccce>

La organoj de la eŭropaj eklezioj arigos ekumenan renkontiĝon por soleni la novan jarmilon.

La Konferenco de la Eŭropaj Eklezioj (KEE) kaj la Konsilio de la eŭropaj episkoparaj konferencoj (KEEK) anoncis la venontan ekumenan renkontiĝon, kiu okazos en Strasburgo (Francio) de la 17-a ĝis la 22-a de aprilo 2001, en la Pasko-semajno, kiu venontjare estos celebrata samdate de ambaŭ kristanaj tradicioj, okcidenta kaj orienta.

La ekumenaj renkontiĝoj de KEE kaj KEEK inaŭguriĝis en 1978 en Chantilly, Francio. La temo proponita por la renkontiĝo en Strasburgo estas: „*Mi estos kun vi ĉiam, ĝis la fino de la mondo*” (Mat 28:20).

En letero al la Eklezioj membroj de KEE kaj al la katolikaj episkoparaj konferencoj, la prezidantoj de la du organizaĵoj, metropolito JÉRÉMIE kaj kardinalo Miloslav VLK, skribas: „Ekde la komenco de la preparo de ĉi tiu evento, la miksa komitato taskita de ĝia organizado esprimis la deziron, ke la ekumena renkonto povu havi lokon en Greklando. Ĝusdate, tamen, evidentiĝis ke pro motivoj ne dependaj de iu ajn volo, tio ne eblos”. La prezidantoj aldonas en la letero, ke oni kontaktis la francajn Ekleziojn membrojn de KEE kaj la francan katolikan episkoparan konferencon, samkiel la Ekleziojn de Strasburgo. La katolika diocezo de Strasburgo jam konfir-

mis sian oficialan inviton, kaj neniu dubas, ke la protestantaj Eklezioj de Strasburgo faros la samon, kiam iliaj decido-organoj kunsidos je la fino de la somero.

Strasburgo proponas diversajn motivojn por esti elektita kiel sidejo de ĉi tia renkontiĝo, ĉar ĝi havas longan tradicion de ekumenaj rilatoj inter la Eklezioj. Kiel landlima urbo, ĝi konis la hororaĵojn de milito kaj la konfliktojn, sed ĝi travivis ankaŭ la sperton de la repaciĝo. Hodiaŭ ĝi gastigas la sidejon de la Konsilio de Eŭropo kaj la kunsidojn de la Eŭropa Parlamento. Ĝi sekve estos taŭga renkontiĝejo por manifestacio kiu akcentas renkonton, dialogon kaj estontecon de la kristana kredo en la tuta Eŭropo.

La listo de la partoprenantoj en la renkontiĝo inkluzivos, aldone al la centra komitato de KEE, al la plena asembleo de la KEEK kaj al diversaj respondeculoj de la Eklezioj en Eŭropo, ankaŭ 100 junajn reprezentantojn, malpli ol 30-jaraĝajn. „Ni esperas tiel — skribas la du prezidantoj — faciligi sperton de aŭtentika renkonto, de profunda kundivido kaj de aŭtentika dialogo ne nur inter la konfesioj, sed ankaŭ inter la generacioj”, por sendi pac-mesaĝon en dividita Eŭropo kaj por redoni elanon al la ekumena movado.

La renkontiĝo de Strasburgo konsistigos krome novan etapon de la realigo de la sindevigo alprenita dum la dua eŭropa ekumena asembleo en Graz, en 1997 „kunaktivigi la junajn generaciojn, konfidante al ili la ekumenan dimension por la estonteco kaj la daŭrigon de la koncilia proceso por

MESAĜO DE ELEKTITO

Vin salutas via nova prezidanto.

Kiu el vi, karaj membroj kaj fidelaj legantoj de *Dia Regno*, dezirus fariĝi prezidanto de KELI en la nunaj cirkonstancoj ne tro rozkoloraj? Mi aŭdas nenium, eĉ ne unu voĉon. Ankaŭ mi silentus, se ne iu devus respondi jese, reagi pozitive. Ĉiuj pensas: 'Mi estas tro aĝa', 'mi ne havas tempon', 'mankas al mi la bezonataj kapabloj' aŭ 'mi ne estas inda'. Samaj kaj analogaj faktoroj validas ankaŭ por mi, sed kion fari, se 'la afero' urĝas, se devo vokas?

Certe ne estas simpla tasko transpreni la prezidantan martelon de persono, kiu tiom longe kaj tiom forte gvidis nian ŝatatan nur statistike malfortan organizaĵon. Mi dankas, ankaŭ en via nomo, pro ĉio kion Adolf BURKHARDT faris dum multaj jaroj por la kristana kaj ekumena Esperantomovado. Mi bezonus amason da vortoj

por adekvate priskribi liajn diversterenajn meritojn. Mi ĝojas, ke li restos ankoraŭ plenan jaron en la estraro por subteni ĝin per siaj saĝa juĝo kaj stimulantaj energio. Dua, pli granda ĝojo, estas ke nia nobla sekretario Els VAN DIJK ne forlasis la estraran ŝipon. Kun ŝi je mia flanko mi kuraĝis diri: „Nu bone, mi akceptos!” De mia ĝojo, laste, mi ekskludas nenium estraron kaj certe ne la multjaran redaktoron de *Dia Regno*, Philippe COUSSON.

Antaŭ ol mi fariĝis membro de KELI, min frapis ke en ĝia nomo mankas la adjektivo 'protestanta'. Iu 'PELI' ja ne facile sukcesus peli min tiufanken. Kiel — kelkfoje tamen 'protestanta' — katoliko, dumviva membro ankaŭ de IKUE, mi ĉiam sentis min ne nur akceptita de KELI-anoj sed ankaŭ kunloĝanto sub la sama teg-

▶ *justeco, paco kaj konservo de la kreo*”.

Oni esperas, krome, ke la renkontiĝo konkludiĝu per la subskribo de la „*Charta oecumenica*” (ekumena ĉarto) fare de la du prezidantoj de KEK kaj KEEK; la projektita teksto estas nuntempe pridebatata de la Eklezioj membroj de KEK kaj de la eŭropaj episkoparaj konferencoj.

La ekumena Komitato (taskita pri la realigo de la renkontiĝo kaj konsistanta el kelkaj episkopoj kaj junuloj, reprezentantoj de episkoparaj konferencoj kaj eŭropaj organizaĵoj) antaŭvidas unuan renkontiĝon kun la junularo la 17-an kaj 18-an de aprilo 2001; la inaŭguro de la oficiala renkontiĝo okazos posttagmeze de la 19-a de aprilo kaj la fermo-ceremonio okazos dimanĉe la 22-an de aprilo 2001.

La prezidantoj kuraĝigas la Ekleziojn,

la Episkoparajn Konferencojn kaj la ekumenajn organizaĵojn de la tuta Eŭropo pripensi la okazigon, dum la paska periodo de 2001, de manifestacioj — naciaj aŭ lokaj — similaj al tiu, kiu okazos en Strasburgo.

Por pliaj informoj:

KEK: Robin GURNEY

tel. +41 22 791 6485

fakso +41 22 791 6227

E-poŝto <reg@cec-kek.org>

KEEK: Helmut STEINDL

tel. +41 26 341 7150

aŭ +41 26 494 3101

fakso +41 26 322 4993

E-poŝto <helmut.steindl@gmx.net>

Carlo SARANDREA
ikue-listo

PRI RADIO AŬSTRIA INTERNACIA AL ĈIUJ KIUJ INTERESIĜAS PRI LA TEMO

Post la novstrukturiĝo ĉijara la radiostacio mem ne plu elsendas je la kostoj de la registaro, ĝi iĝis parto de la entrepreno ÖRF, kiu estas sendependa stacio „Aŭstria Radio kaj Televido”. Ĝi disponigos por la sekva jaro 2001 la duonon de la ĝisnuna budĝeto. (nur 50% !!!) La novstrukturiĝo estas memkompreneble la rezulto de la ŝparde la nuna registaro.

Kun bedaŭro mi konstatas, ke en Esperantio oni apenaŭ interesiĝis pri la temo dum la tempo kiam estis la krizo, kvankam plurloke aperis alvoko por helpagado. Eĉ dum la kunsido de Radio-Amikoj dum UK en Tel-Avivo oni ne informis la partoprenantojn pri la problemo.

Do, mi estas kontenta, ke mi povis tamen savi la programon, parte pere de financa subteno de geaŭskultantoj, parte per antaŭvidataj

varbdisaŭdigoj. Nur ne tiom abunde kiel ĝis nun. Dum la vintra periodo 2000/2001 estos nur 2 Esperantlingvaj programoj elsendotaj de Radio Aŭstria Internacia dum vendredaj kaj dimanĉaj vesperoj, je 21.30 UTC en la frekvencoj 6155 kHz, 5945 kHz por Eŭropo kaj en 13730 kHz por Nordafriko.

Memkompreneble nek la satelita, nek la reta programaliro estos limigota.

La teamo de Esperanto-Redakcio en Radio Aŭstria Internacia dankas vian alskribon kaj esperante, ke vi restos nia fidela aŭskultanto; sincere salutas vin!

Katalin FETES-TOSZEGI
roi.esperanto@orf.at
http.roi.orf.at/esperanto
Interredaktore

▶ mento. Mia revo ade estis, ke iam katolikaj esperantistoj konfesos sin kristanoj en tiu senco, ke ili kune kun KELI-anoj emos krei unu vastan kaj solidan evangelie inspiritan Esperantion! Neniam mi perdis la esperon, ke la virga IKUE kaj la fraŭla KELI, post varmaj ĉirkaŭbrakoj kaj amoplena gefianĉiĝo en Limburg/Lahn (1968), serioze strebos al porĉiama geedziĝo, de la plej alta ĉielo nepre antaŭvidata kaj benota...

Al la estraro mi sciigis, ke miaj multaj taskoj, tre variaj kaj lasantaj apenaŭ liberan tempon, ne permesas al mi dediĉi min al KELI tiom kiom la prezidanteco fakte postulas.

Vi scias, ke mi ofte vojaĝas por renkonti kaj helpi homojn vidhandikapitajn. Ankoraŭ antaŭ kelke da semajnoj Vera kaj mi migris tra Bulgario. Ni parolis kun multaj homoj, sed preskaŭ ĉiam ni bezonis la helpon de esperantistoj por interpreti. „Kial lerni Esperanton? Ĉiu ja parolas la anglan!” Nenio estas malpli vera. Ĉiutage mi fariĝas esperantisto pli konvinkita. Sed ĉu tiu

konvinko kreskigos nian organizaĵon, kiu estas ne multe pli ol 'malgranda grego' en la verdstela pejzaĝo? Dum la ĉijara jarkunveno iu rimarkigis: „Al KELI mankas strategia plano. Kiel ekzemple altiri novajn membrojn kaj legantojn?” Miaopinie ni ne bezonas unualoke belajn planojn sed bonajn kaj diligentajn propagandistojn inter kristanoj!

La venontan jaron IKUE kaj KELI komune kongresos en Zagreb. Jam nun mi invitas vin partopreni. Venu! Venu amase! La temo estas aktuala, provoka kaj imperativa: **ADORU!** Miaflanke mi promesas fari ĉion eblan por ebligi fekundan ekumanan klimaton inter ambaŭ kristane epitetitaj organizaĵoj.

KELI-anoj kaj IKUE-anoj, ni apenaŭ konscias pri tio, kiom riĉaj kaj privilegiitaj ni estas. Kaj kiel aktivaj, viglaj revantoj pri estonta, jam ombre/vuale realiĝanta Regno de Dio, kaj kiel esperantistoj!

Jacques TUINDER

KRISTANA ESPERANTO-KONGRESO (50-A DE KELI)

Ni, kristanoj el diversaj konfesioj, el 10 landoj kaj lingvoj, kongresis en Janské Lázně, en Ĉeĥa Respubliko, de la 5-a ĝis la 12-a de Aŭgusto 2000.

Dum tiu semajno, ni havis la okazon eklerni, per prezento de kelkaj figuroj, el la ĉeĥaj kulturo, literaturo, muziko, historio, ankaŭ el la ĉeĥaj ekleziaj historio kaj vivo.

Ni povis renkontiĝi kun pastoro SME-TANA, la prezidanto de la Ĉeĥ-frata Evangelia Eklezio.

Ĉeĥa kristana pentristo troviĝis inter ni, ekspoziciis, kaj povis klarigi iomete al ni sian arton.

Ni ankaŭ havis la eblecon aŭskulti kaj pridemandi tradukiston de la Biblio kaj de klasikaj tekstoj.

Ni, krome, profitis la okazon por viziti la regionon de la Montoj de la Gigantoj (Krkonŝe), kaj kelkajn lokojn gravajn por la ĉeĥa kulturo.

Ni, kiel ĉiujare, povis komune mediti la Biblion, preĝi, kanti kaj laŭdi Dion. Per tio ni alkitimiĝas al diversaj ekleziaj tradicioj.

Sed, ĉion ĉi tion ni povis fari komune, parolante inter ni unu internacian lingvon komunan, nome Esperanto.

Tiu senpera kontakto permesas pli veran konatiĝon, kaj rezultigas interŝanĝojn, respekton kaj amikiĝon.

Tiu ĉi kongreso, kiu estis jubilea, nia 50-a, estis okazo de rigardo al nia pasinteco, kun danko al Dio, kaj al la estonteco, kun plena espero: nova prezento de nia revuo *Dia Regno*, kaj baldaŭa eldono de Ekumena Diservo Libro *Adoru*.

Kristana Esperantista Ligo Internacia planas sekvantan kongreson, sian 51-an,

kune kun la katolikoj ĉi-foje, en Zagreb, Kroatio, de la 14-a ĝis la 21-a de julio 2001.

Sinteza teksto de
Philippe COUSSON

IMPRESO PRI KONGRESO

Ĝoje kaj dankeme ni revenis hejme post la 50-a KELI-Kongreso 2000 en Janske Lazne.

Unue ririgardo: en la tempo, kiam ni aliĝis ĉe KELI kaj preparis nian unuan KELI-kongreson en Kaunas/Litovio, mi legis pri la kongreso en Gostyń/Pollando, estis artikolo de Anna LANDFORS. Ŝi interalie priskribis la ĝojigantan kantadon — tio siatempe tre interesigis min.

Do — ni ankaŭ ĉi tiun someron multe kantis kun Adolf BURKHARDT- estis granda ĝojo. Plie ni ankaŭ kantis Taizé-kantojn, kaj psalmojn en la gregoriana stilo. Ni popoldancis kun Grete. Ni aŭdis prelegojn, pri COMENIUS, pri HUS kaj aliaj — ĉio estis vere interesa. Grava estis la klarigado de Gerrit BERVELING pri lia nova traduko de la Sankta Biblio. Oni elektis la novan estraron. Kortuŝa estis la fina Diservo, sabate, la 12-an de aŭgusto 2000.

Ni dankas al la domo „Sola Fide”, oni bonege zorgis por ni. Antaŭ ĉio ni dankas al Pavel POLNICKY, li estis helpema kaj bonkora. Kompreneble ankaŭ ni dankas al lia edzino kaj al lia frato. Ili estis preparintaj du interesajn ekskursojn. Oni — kiel ĉiam — miris, ke la semajno de la KELI-Kongreso tiel rapide estis ĉe la fino. Ankoraŭfoje Dank' al ĉiuj, Dank' al Dio!

Iu kongresano
(mi ne plu scias kiu)

IMPRESOJ DE LA 50-A KELI-KONGRESO (2000-08-05/12)

La ĉi-jara Kristana Kongreso aranĝita de KELI okazis en la Krkonŝe Montaro (Giganta Montaro) apud la landlimo kun Pollando. Janské Lázně estas ripozplena banloko je alteco de 670 metroj. La kongresejo estis bone ekipita ripozejo de la Ĉeĥfrata Evangelika Eklezio. La nomo de la domo estis „Sola Fide”. La ĉeforganizinto de la kongreso estis Pavel POLNICKY. Helpintoj estis lia frato Thomáš kaj Marcelà ZWESCHPEROVA. La KELI-kasisto, sekretario kaj prezidanto alvenis jam vendrede por priparoli la kongressemajnon. Nia kongreso estis pli vaste dikongigita al la gastoj kaj enloĝantoj pere de diversaj publikaj kanaloj de la urbeto. Inter alie pere de la eklezia informilo.

Sabaton alvenis la gastoj ĝis la malfrua vespero. Thomáš atendis la aŭtobusvojaĝintojn ĉe la haltejo kaj kondukis ilin al la kongresejo. La distanco estis malgranda sed la vojo multe supreniris.

Dum la tuta semajno okazis certaj eroj je fiksitaj horoj inter alie popoldancado, ĥorkantado, matenaj, tagmezaj kaj vesperaj preĝoj. La tagfinaj kaj vesperaj preĝoj estis gvidataj de Pavel POLNICKÝ, Philippe COUSSON, Adolf BURKHARDT, Kazimierz LEJA, Éva FARKAS, Britta REHM. Agrabla, malstreĉita programero estis la popoldancado gvidita de Grete BURKHARDT.

Sabaton posttagmeze malfermiĝis oficiale en la preĝejo de *Sola Fide* la ekspozicion kun verkoj de la pentristo Václav LAMR. Li laboras inter la ciganoj kaj pentras Kristanajn pentraĵojn per diversspecaj materialoj. La gastoj kaj enloĝantoj de la urbeto havis la eblecon dum la tuta semajno viziti la ekspozicion senpage.

Laŭdire multaj eluzis la eblecon. La interkona vespero frue finiĝis ĉar la plej multaj alvenintoj longe vojaĝis.

Dimanĉon matene okazis la unua kongresa Diservo kun Sankta Manĝo gvidita de Adolf BURKHARDT. La pianisto kaj orgenisto de la kongressemajno estis Christof ROETHER. La bibliajn legaĵojn




Grava triopo en la vivo de KELI, de maldekstre: Els VAN DIJK, Siegfried KRÜGER kaj Kazimierz LEJA. (fotis PC)

faris Philippe COUSSON kaj Éva FARKAS. Je la 15-a horo ni havis la eblecon ĉesti la ordinon de sinjoro inĝ. M. CEJNAR, la estro de la kongresejo. La konsakrinto estis Mag. SMETANA. Li estas la prezidanto de la Sinoda Konsilio de la Evangelika Ĉeĥfrata Eklezio kaj la prezidanto de la Ekumena Konsilio de Ĉeĥio. Post la lunĉo kaj antaŭ la Diservo magistro Smetana rakontis pri la historio de la Protestantaj Eklezioj en sia lando. Vespere ni ĝuis spiritan koncerton en la Preĝejo kun inter alie muziko de DVOŘÁK (Bibliaj Kantoj, esperantigitaj de J. KOŘÍNEK), HAENDEL,

MOZART. Ĉiuj kantoj estis kantitaj en Esperanto fare de la profesiaj kantistoj: Jiří ENDRST kaj Miroslav SMYCKA kun orgenakompenado de Vaclav URBAN.

Lundon matene la kantemuloj havis la eblecon ekzerci instigite de Adolf BURKHARDT. S-ro Vlastimil KOČVARA prelegis pri COMENIUS kaj kelkaj personoj aldonis interesajn aspektojn pri lia restado en Hungario, Nederlando kaj Svedio. Pro la malbona vetero ne okazis postagmeze la ekskurso al la Nigra Monto (Ĉerna Hora) anstataŭ ni aŭskultis la prelegojn de



La kongresejo kaj la apuda preĝejo, ambaŭ de la ĉeĥ-frata evangelia eklezio. (fotis PC)

mardo posttagmeze. La vespera programo estis dediĉita al la ĉi-jara 50-a KELI-Kongreso. Per diapozitivaj mi refreŝigis niajn memorojn pri la antaŭaj kongresoj. Arne LUNDKVIST estis la nura ĉeestanta persono kiu partoprenis la unuan KELI-kongreson en Tostarp (1948).

Mardon matene okazis prelego pri K. ČAPEK kaj K. H. MÁCHA fare de Vlastimil KOČVARA. Posttagmeze finfine ni povis ĝui la promenadon sur la Ĉerna Hora. Post mallonga piedirado ni atingis la telferon per kiu ni supreniris ĝis la pinto de la monto je alteco de 1299 metroj. Estis 3 eblecoj por malsupreniri: reiri laŭ la sama maniero, promeni laŭ iom facila vojo aŭ per pli longa kaj malebena vojo. Mi aliĝis al la lasta grupo kaj mi ĝuis belan panoramon

kaj longan promenadon de 3 horoj. Vespere prelegis Siegfried KRÜGER helpe de diapozitivaj pri la pentraĵoj de Marc CHAGALL.

La ekskurso de **merkredo** kondukis nin al Kuks. La grafo SPORCK konstruis ĉe la urbo barokstilan kastelon kun pluraj diverscelaj konstruaĵoj. Sur la teraso kaj en la preĝejo troviĝas grandegajn skulptaĵojn de la skulptisto Matthias BRAUN. Vidindaĵo estis ankaŭ la antikva apoteko. Alia ekskurscelo estis la kastelo de Nachod. La tago estis benata per bela vetero kaj la distancoj inter la ekskursceloj ne tro longaj. Tagmeze ni ĝuis la enhavon de bone preparita lunĉpakedo en kafĝardeno. Vespere ni aŭskultis la prelegeton pri Milada HORÁKOVÁ.

Ĵaŭdon matene okazis la KELI-jarkunveno pri kiu mi aliloke raportis. Posttagmeze prelegis Gerrit BERVELING pri la temo „Kial denove traduki la Bibliion”. La popoldancado gvidite de Grete BURKHARDT agrable movigis nin. En la kinejo de la urbeto ni denove aŭskultis koncerton. La kantistoj de la preĝeja koncerte kantis pli popularajn melodiojn en pluraj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto. La urba konsilantaro disponigis al la kongreso senpage la kinejan salonon kaj per afiŝoj estis ankaŭ nesesperantistoj invititaj por la koncerto. Estis altnivela kaj amuza programo.

Vendredon, post la kutima kantadhoru, prelegis s-ro POSPIŠIL pri T. G. MASARYK, kaj Peter CHRDLÉ pri la Husana Eklezio. Per kongresa Diservo solene finiĝis la kongreson jam je la 17-a horo ĉar sabaton matenon forveturis jam multaj kongresanoj frumatene. Adolf BURKHARDT gvidis la Diservon kaj Éva FARKAS predikis. El la Biblio legis: Bogdan DEMBIEC, Philippe COUSSON. La monkolokto estis destinita por „Evidente” de Jacques TUINDER. La unuan fojon dum kongreso okazis la oficiala instalo kaj beno de la KELI-

PROTOKOLO DE LA KELI-JARKUNVENO (10-08-2000)

Ĉeestis la jenaj estraranoj:

Adolf BURKHARDT (prezidanto), Philippe COUSSON (vic-prezidanto kaj redaktoro), Siegfried KRÜGER (kasisto), Els VAN DIJK (sekretario), membroj: Éva FARKAS, Arne LUNDKVIST, Pavel POLNICKÝ, David FEATHERSTONE.

1. **Malfermo** fare de la prezidanto.

2. **Elektado de la kunprotokolantoj**: Kazimierz LEJA, Christof ROETHER.

3. **Funebra memorigo**. Nederlando: Wim VAN GANSWIJK, Neeltje SIMONIDES, Tini PUTTO, Jan VERHEULE. Hungario: Jozef FARKAS. Ĉeĥio: Stanislava CHRDLŮVA, Libuše BLAHOVA.

4. **Sekretaria jarraporto**. Alvoko al la membroj sendi al la sekretario aŭ redaktoro informojn pri eventoj, agado.

5. **Kasista jarraporto**. La kasisto eksplikas ke pro miskompreno ne aperis la financa raporto en *Dia Regno*. Ni disdonis ĝin kun la kongresaj paperoj komence de la kongressemajno. La financa raporto estas ankoraŭ en Nederlandaj guldenoj.

► estraro. Dum la adiaŭa vespero prezentis la kongresanoj teatraĵojn kaj kantojn. Prezentis la programon Els VAN DIJK kaj Philippe COUSSON. La LKK kaj aliaj kunlaborantoj estis honoritaj pere de donacoj. Ni speciale dankis al Pavel kaj Thomás POLNICKÝ kaj Marcella ZWESCHPEROVÁ. La adiaŭa vespero finiĝis kun kongresresumo fare de Philippe COUSSON.

Sabaton matene tre frue forveturis la plej multaj el la kongresanoj kaj ni restis kun Grete kaj Adolf BURKHARDT por ferii plian semajnon en tiu ĉi bela regiono.

Els VAN DIJK

KELI estas registrita ĉe la Nederlanda Ĉambro de Komercio ĉar la konto estas en la Nederlanda Postbank. Dum la lasta jaro malkreskis la elspezoj por *Dia Regno* i. a. dank'al la eldono 6 fojojn jare.

Al la kreditoroj apartenas ankaŭ la Hungara Kaso (parto de la gajno de kongresoj en Hungario). Post telefon Alvoko kun Elsbeth WALDER el Svisio la Svisa Kaso transiris al la Helpa Kaso.

Esperanto Misio estas heredaĵo de la Sveda Sekcio. Ĝi estas nun traktata kiel KELI-fonduso. Post la kongreso en Gliwice (1999) estis la materialo de Esperanto-Misio transportata al Litovio.

6. **Raporto de la kaskontrolantoj**, Karl Heinz SCHAEFFER kaj Willy SCHÄFER. La kasisto estas malŝarĝigita kun 2 sindentenoj.

7. **Buĝeto**. La enspezoj malgrandiĝas. La kotizo ne kovras la elspezojn. En tiu ĉi jaro estas negativa saldo de NLG 470. En 1999 kaj 2000 okazis kotizaltigo. La enloĝantoj de la ekssocialismaj landoj estas petataj kontribui laŭ povo. Ni scias ke membroj el kelkaj landoj ne povas pagi pro la malbona ekonomia situacio en sia lando. Kontribuoj




La montaro de la Gigantoj (Krknosé), dum la pieda promeno. (fotis PC)

▶ al la *Adopta Kaso* estas necesaj. Multaj Svedoj malaliĝis kaj la kialo ne estas tute klara. En Hungario malaliĝis kelkaj membroj ĉar ili estis petataj finance kontribui. Kiam forstreki abonanton aŭ membron kiu ne pagas sian kotizon? Post unu jaro de ne-pago admonas la kasisto kaj poste li malregistras la nepaganton.

La *Literatura Kaso* enhavas la gajnon de la vendado de *Adoru Kantante*.

Kotizaltigo. En 2000 ni pagas 15 €. En la pasinteco ne restis mono por i. a. speciala agado. Propono: en 2002 kotizaltigo ĝis 20 € por individuaj membroj. Por abonantoj k. t. p. la estraro decidus. La jarkunveno akceptas la proponon.



Nia organizanto kaj ĉiĉerono:
Pavel POLNICKÝ. (fotis PC)

8. Jarraporto de la redaktoro de *Dia Regno*.

En Gliwice (1999) pripensis malgranda komisiono la novan aspekton de *Dia Regno*. La kongresanoj estis kontentaj pri la nova aspekto. Se iu tradukas artikolon por *Dia Regno* ne forgesu peti permeson de la aŭtoro aŭ redaktoro. Pli bone estas komenti artikolon ĉar por tio ne necesas permeso. La redaktoro ne povas informi la sendinto de iu artikolo kiam ĝi aperos.



Nia finna membro Olavi Kantele, dum la promenado en la montoj. (fotis PC)

La redaktoro decidus pri tio. Eblas ensendi per tajpmaŝino verkitan artikolon. Povus esti interese unu fojon jare prepari eldonon kun speciala temo.

9. **Esperanto Misio.** Ni ne ricevis raporton. Membro el Svedio vojaĝos al la Baltaj landoj kaj provos kontakti. La sekretario petos raporton.

10. **Estrarelektio.** Finiĝas la deĵorperiodo de Adolf BURKHARDT, Arne LUNDKVIST, Philippe COUSSON, Éva FARKAS, David FEATHERSTONE. Arne, Éva kaj David ne rekandidatiĝas. Adolf ne rekandidatiĝas kiel prezidanto sed li restas membro de la estraro por ekumenaj aferoj. La jarkunveno elektas Jacques TUINDER kiel novan prezidanton. Li estas multjara membro de nia estraro. Li estas membro de la Rom-Katolika Eklezio sed ne estas statutaj obstakloj por lia elekto. Ni ĝojas ke li pretas transpreni la prezidantan martelon. Dum unu jaro ni vane serĉis posteulon de la prezidanto. Eva restas membro de la Ekumena Komisiono kaj postsekvas ŝin en la estraro Irén BAGI. Nova estrarano el Svedio estas Bengt-Olof ÅRADSSON kaj el Britio Geoffrey DOROW. David FEATHERSTONE tenos la kontakton kun la Biblia Societo en Britio. La ekŝiĝantaj estraranoj ricevas dankdonacon.

KIA LIBERALECO DECAS AL KRISTANO?

Kiam S-ro BERVELING skribas, ke kristano estu liberala, mankas difino, kian liberecon li celas. Sed laŭ la sekva teksto ŝajnas esti la plej radikala: lasi al ĉiu sian propran kredon, eĉ nekristanan, sen ia ajn interveno. Sed laŭ mi oni devas distingi tri nivelojn pri traktado de aliaj sintenoj:

▶ **Estrara Bulteno.** Geoffrey DOROW forsendos ĝin rete kaj Pavel POLNICKÝ per poŝto.

11. **Kongresoj.** En 2001 (antaŭ la Universala Kongreso) okazos la Ekumena Kongreso en Zagreb (la 51-a de KELI kaj la 15-a Ekumena Kongreso). Kongresejo estos la Episkopa Mezlerneja Seminario proksimume al la kongresejo de la Universala Kongreso (21-28 Julio). Nia kongresa temo estos „Adoru”. La ĉeestantoj aprobas la proponon.

La Hungaroj invitas nin en 2002 por Kristana Kongreso aranĝita de KELI al Berekfürdő Banloko). La kongresejo estos konferenceto de la Reformita Eklezio. Ĝi estas sufiĉe granda kun diversaj kunvenejaj ĉambroj kaj muzikinstrumentoj. Ĝi estas taŭga por rulseĝoj. La LKK proponas la 1-an aŭ 2-en semajnon de aŭgusto. La membroj aprobas.

12. Ideoj kaj sugestoj de la membroj.

Al KELI mankas *strategia plano*. Kiel ekzemple altiri novajn legantojn? Iam ekzistis laborplano sed pro manko de kunlaborantoj ĝi malaperis. Okazos monkolekto dum la lasta kongresa Diservo de tiu ĉi kongreso por Evidente. Ni proponas subvencion de 500 € por la *Junulara Esperanto Tendaro* (JET). Oni petis 1000 €.

13. La prezidanto fermas la kunvenon.

Els VAN DIJK
kunprotokolantoj:
Kazimierz LEJA, Christof ROETHER

1) Plena agnosko kiel same bona, afero de persona gusto.

2) Malkonsento ĉe neesenca afero: Se oni opinias, ke iu kutimo estas malbona aŭ konvinko malprava, oni ne silentu pri tio. Sed dum ĉio baziĝas sur la unu fundamento metita (1 Kor. 3,11), oni povas kalkuli malsamopinianton tamen kiel kunkristanon, kunkredanton, saviton.

3) Amo de persono kun klara distanciĝo. Se la konvinko de alia persono aŭ organizaĵo ne kongruas kun bazaj principoj esprimitaj de Jesuo, komunaj aktivaj nur povas esti fruktdonaj, se ili celas interkompreniĝon. Kunlaboro ne eblas (krom pure teknika), ĉar oni ne laboras por la sama afero. Inter tiuj bazaj principoj, el kiuj nutras sin la tuta Nova Testamento, tiu resumita en Johano 3,16 estas la plej malfacile akceptebla kaj do bona mezurilo: „Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidus al li, ne pereu, sed havu eternan vivon”.

Reinhard PFLÜGER
Deutschherrnufer 4
DE-60594 Frankfurt
069-597 84 67

<reinhard.pflueger@esperanto.de>

Estraro de KELI. Inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo.

prezidanto: Jacques TUINDER (2003), **vic-prezidanto kaj redaktoro:** Philippe COUSSON (2003), **sekretario:** Els VANDIJK (2001), **kasisto:** Siegfried KRÜGER (2002), **membroj:** Irén BAGI (2003), Adolf BURKHARDT (2003), MA Youngtae (2001), Bengt Olof ÅRADSSON (2003), Pavel POLNICKÝ (2002), Britta REHM (2001), Geoffrey DOROW (2003).

Se pensi legante recenzon pri „*Ke ĉiuj Estu unu*” (maja *Dia Regno*).

Kune legante la recenzon, oni sin trovis mislokitaj rilate la amplekson de la koncepto de ekumenismo: ĉu tiu ĉi etendiĝas tiom kiom vastas la kristanaj eklezioj aŭ al ĝi apartenas ankaŭ la dialogo kun la nekristanaj religioj? En nia medio validas la unua, kvankam oni intencas dialogi ankaŭ kun nekristanaj religioj. Kial ni kristanoj ne havas konvencian unikan koncepton pri la senco de la vorto „ekumenismo”? Tio evitus ke la aŭtoroj de la ekumena recenzita libro, evidente ekumena laŭ la unua senco, estu akuzataj je manko de morala alteco aŭ de ekumenismeco; kaj helpus ke iu sciu je kiu punkto sin loki kaj kie lokigi la dialogantojn. Tiuj teknikismoj estus kvazaŭ reloj sur kiuj trakurigi la dialogon.

La recenzo konsciigas ankaŭ ke ni mankas je komuna nocio pri dogmo. Sende pende de la sinteno koncerne la dogmojn, necesas marŝi tra komunaj precizaj nocioj por ke oni informiĝu pri kio oni estas parolanta. El la paĝo de BERVELING malfacilas certigi pri la amplekso de la koncepto de dogmo, pri kiuj li ne havas bonajn rilatojn: ĉe la profano dogmo estas koncepto klara, male ĉe „ekumenismuloj” ĝi ŝpruciĝas en cent franĝojn.

Koncerne la fakton, favore komentitan de BERVELING, ke iuj eklezioj ne nur rifuzas dogmojn sed ankaŭ kiun ajn kredkonfesion, fariĝas iom malfacile por ordinara menso: ĉu temas pri repuŝo de dogmoj jam formulitaj aŭ forpuŝo de ĉiu aserto kredenda, opiniata objektiva? En tiu dua kazo, fari ekumenismon estus kiel nupti inter senkorpuloj!

Fine al ni ŝajnas ke el la paŭlaj pecoj

cititaj de BERVELING, laŭ kiuj ekde la komenco en kristanismo ekzistis multaj „eklezioj” (pro kio jen la veo de BERVELING kontraŭ „Ke ĉiuj estu unu”) proklamas ankaŭ ke la eklezio devas esti unu sola!... kun enhavoj pecizaj kaj objektive priskribeblaj!

Se licas nia slogano, ni imagas ke ĉiu ekumenismema kristano rajtas pensi: „mia eklezio akceptas la unikan veran revelacion; la aliaj aldonas aŭ malaldonas ion. Tamen mi ilin ĉiujn amas kaj ĝojas pro iliaj sukcesoj kaj suferas pro iliaj malsukcesoj, kaj deziras ke ili disvastigu la novaĵon de la korpa resurekto de Kristo ktp... kaj dume mi dialogas kun ili...”. Ĉu ni tro naivas?

Kolektis opiniojn

Armando ZECCHIN

„...Vera Eklezio estas afero spirita, kiu aperas en homa socio (...) La Eklezion konsistigas spirite renaskitaj personoj kiuj diferencigas de aliaj homestaĵoj per sia alta maniero de la vivo, donita al ili dum ilia spirita renaskiĝo.

Ilia deveno estas de Dio kaj civitaneco en ĉielo.

Ili laŭdas Dion en la spirito, ĝojas en Jesuo Kristo kaj ne metas fidon en karno.

Ili estas raso elektita, reĝa pastraro, nacio sankta, popolo Diposedata (...)

Kaj ne estas en ili malmolaj sentoj — nur kompato, bonkoreco kaj dezirego, por ke ĉiuj homoj povu penti kaj repaciĝi kun Dio. Jen la esenca resumo de unu el la aspektoj de la novtestamenta instruo pri la Eklezio. Kaj alia vero, pli grava kaj pli malkovra diras, ke la Eklezio estas korpo spirita, organika unueco, ligita per ekzistanta en ĝi VIVO.

Aiden Wilson TOZER

1		2	3	4	5		6
		7					
8	9		10			11	
12		13			14		
15					16		
17			18	19		20	
		21			22		
23							

Kromsolvo

16	14	1	4	15	13	18
----	----	---	---	----	----	----

Krucvortenigmo

horizontale: 1. lok' en preĝejo, 7. movi boaton, 8. mallongigo por krono, 10. pronomo, 11. malgrandiga sufikso, 13. koncernante publikan sanon, 16. regula interarang', 16. duop', 17. kemia simbolo de fero, 18. deriva sufikso, 20. ripeta prefikso, 21. centr' de cirko, 23. patruja urbeto de Jesuo.

vertikale: 1. blovinstrument', 2. kemia simbolo de kriptono, 3. dezirimagi, 4. kopi', 5. refleksiva pronomo, 6. kurante pagenda kompenso, 9. maloŭtece, 11. malĝusta far', 13. kemia simbolo de neodimo, 14. mallongigo de Apokalipso, 18. valormetala, 19. prepozicio, 21. sufikso por formi enzimumoj, 22. malakcepta adverbo.

kromsolvo:

La suferoj de Jesuo

Fritz LAUTENBACH

Karaj,

mia peto pri morala helpo en la elekto de kantoj por *ADORU* restis, kun unu escepto, sed ia respondo: mi petis en *Dia Regno*, en *Ökumenisches Esperanto-Forum* kaj en *Janské Lázně* indiki kelkajn (dek aŭ laŭvole pli) da numeroj el *Adoru Kantante* kaj el aliaj kantaroj, kiuj nepre devas reaperi en *ADORU*, kaj eĉ pli grave, kiuj povus esti ellasitaj; la spaco ne sufiĉas, pro abunda materialo, simple enkorpiĝi la tutan enhavon de *Adoru Kantante* kaj *Tero kaj Ĉielo Kantu*. Estus helpe, se nia elekto havus iom da subteno — certe tre subjektiva, sed ankaŭ nia ne povas ne esti subjektiva, kvankam ni klopodas konsideri variecon de nacioj kaj konfesioj. Se vi mem ne emas aŭ povas, eble vi povas tamen preparoli la temon kun aliaj. Ne plu restas multa tempo por cerbumi. La problemo de pagoj por kopirajtoj premas nin. Ni ne deziras elspezi monon por kanto kiun neniu deziras. Kuraĝigis nin la decido de la fratoj de Taizé kaj de la nederlandaj instancoj doni senpagan permeson. Sed tio bedaŭrinde montriĝas escepto. Aŭtoroj tre volonte permesas, ankaŭ senpage, sed ne la eldonejoj.

Kun koraj salutoj,
via

Adolf BURKHARDT

Solvo el la n-ro 823

horizontale: 1. absolvon, 8. IKUE, 9. eĉ, 11. an', 12. ok, 13. sek', 15. ĉifr', 17. teologio, 19. aska, 20. lul', 21. NT, 22. Nb, 24. RO, 25. etos', 27. enterigo.

vertikale: 1. atestante, 2. si, 3. oka, 4. lunĉo, 5. ve, 6. O, 7. nekrologo, 10. ĉeest', 12. ofiur', 14. kok', 16. igl', 18. lante, 23. bor', 25. et, 26. si.

kromsolvo:

ornato

LA PLEJ GRANDA ESPERANTO— KATALOGO EN LA RETO

Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu posedas la plej grandan planlingvan bibliotekon, realigas ekde 1996 unikan projekton: la kreon de la elektronika katalogo TROVANTO, konsultebla en interreto.

En la nuna momento troviĝas jam pli ol 9400 rikordoj (dokumentoj) en ĝi, kaj tiu nombro kreskas ĉiumonate. Jam nun ĝi estas la plej granda katalogo pri Esperanto kaj interlingvistiko.

Kiuj dokumentoj estas indikitaj en TROVANTO?

Libroj, broŝuroj, eksterkomercaj publikigaĵoj, manuskriptoj, aŭd- kaj vid-kasedoj, kompaktdiskoj, sciencaj artikoloj en libroj ktp (sed ne revuoj).

Laŭ kiuj kriterioj oni trovas la dokumentojn?

Laŭ aŭtoroj, titoloj, titolvortoj, temoj, eldonejoj, eldonlokoj, jaroj k. t. p.

ALVOKO

La Aŭstria Nacia Biblioteko financas la kreon de TROVANTO. La daŭrigo de la laboro tamen povas okazi nur, se la esperantistoj ĝin fakte bezonas. Tio signifas: se sufiĉe da homoj utiligas TROVANTO-n en la interreto. Tial ni invitas vin regule viziti ĝin. Ĝia adreso:

<http://www.onb.ac.at/online_s/onspdbfr.htm>

Alia eblo aliri estas tra la hejmpaĝo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: <<http://www.onb.ac.at/sammlgn/safr.htm>>.

Se vi volas esti regule informata pri la evoluo de TROVANTO, bonvolu skribi al jena adreso:

Mag. Helga FARUKUOYE

Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg,
Michaeler Kuppel, AT-1010 Wien.

<helga.farukuoye@onb.ac.at>

Nia retkatalogo: <http://www.onb.ac.at/ev/online_s/onspdbfr.htm> aŭ en kazo de ŝanĝo nur: <<http://www.onb.ac.at>> kaj de tie al „collections” aŭ „Sammlungen”, kie vi trovos la Internacian Esperanto-Muzeon kaj ankaŭ ĝian datumbankon!

Interredaktore

Estimataj!

Ekde la 3-a de oktobro TROVANTO jam enhavas 9450 rikordojn!

La projekto de enretigo de la plej granda Esperanto katalogo rapide progresas. Jarfine nia elektronika datumbanko atingos la amplekson de 10 rikordoj, kio faras ĝin jam taŭga helpilo por multaj bibliotekoj, eldonejoj kaj privataj personoj en Esperantujo. Post ne pli ol kvin jaroj ni prezentos la pli-malpli kompletan literaturon en kaj pri Esperanto en la interreto, se ni ricevos la necesan subtenon de la ŝtataj institucioj.

Fakte tiu subteno dependas de la utilo de nia laboro, kiun oni konstante mezuras per monataj statistikoj. Ĉiu vizito de niaj paĝoj estas kalkulata, kaj tiel helpas nin daŭrigi en tiu unika entrepreno. Ni ripetas do nian peton de tempo al tempo viziti nian katalogon TROVANTO, kiu malfermas al vi tre interesan kaj multifacetan mondon: la Esperanto-literaturon.

Ni certas, ke vi ĝuos vian vojaĝon inter malnovaj volumoj, modernaj kanzonoj, amuzaj vidbendoj, ludoj ktp., pri kies ekzisto vi eble tute ne sciis. Kaj eble iam vi mendos kopion de iu artikolo aŭ libreto, por kompletigi vian scion pri tio, kio estas nia komuna amo: Esperanto.

Korajn salutojn!

Mag. Helga FARUKUOYE

Kongresaj kotizoj

pageblaj en kunaĵoj (kroacia mono), ĉiuj eŭropaj valutoj aŭ dolaroj.

Tarifo A: Ĉiuj landoj sen B. Tarifo B: Eŭropa Unio, Skandinavio, Svisio, Nord-Ameriko

1. Kongresa aliĝ-kotizo (ne repagebla) por ĉiu persono:

ĝis 31.12.2000:	A: 5 €	B: 30 €
ĝis 31.03.2001:	A: 10 €	B: 40 €
ekde 1.04.2001:	A: 20 €	B: 50 €

2. Kongres-kotizo aldone pagenda en la kongresejo:

2.1. Kun 2–5-lita ĉambro /1 persono:	A: 150 €	B: 230 €
2.2. Sen tranoktoj, kun tag- kaj vespermanĝoj:	A: 80 €	B: 130 €
2.3. Familioj 3–5 personaj (infanoj/junuloj ĝis 25 jaraĵ) ĉiuj en la sama ĉambro:	A: 180 €	B: 300 €

3. Hotelaj prezoj (euroj): 7 noktoj (enestas 10%-a rabato, nur per la kongresejo):

ĉambro:	1-lita	2-lita	2-lita pli granda	3-lita apartamento	4-lita apartamento
ILICA	252	280	336	539	658
JADRAN	294	371			

4. JET'2001-anoj loĝos aparte, sed en la sama domo. Ili havas grand-parte propran junularan programon. La plen-aĝaj responsuloj de la grupoj helpas en la porjunula kaj porinfana programoj.

Partoprenantoj de JET'2001 el A-landoj, kiuj loĝas pli ol 500 km aer-distance de Zagreb, povas ricevi **vojaĝ-subsidion**. Se la loĝloko distancas de Zagreb pli ol 500 aer-liniajn km = 20 €, pli ol 1000 aer-liniajn km = 40 €, pli ol 1500 aer-liniajn km = 60 €. Necesas demandi antaŭkongrese pastron B. EICKORN.

5. JET-anoj pagas jenajn JET-kotizojn:

5.1. Unuopulaj gejunuloj ĝis 25 jaroj:	A: 90 €	B: 140 €
5.2. Familioj aŭ grupoj ĝis 5 personoj (1-2 responsaj plen-aĝuloj, kaj inkluzive de ĉiuj gejunuloj ĝis 25 jaroj):	A: 175 €	B: 300 €
Do en 5-persona grupo ĉiu pagos	A: 35 € aŭ	B: 60 € plus la aliĝ-sumon.

Adresoj de la respondeculoj de KELI, IKUE kaj de la LKK:

Adolf BURKHARDT, Gimpelweg 1, DE-73235 Weilheim/Teck, fakso: + 49 7023 72413
<Adolf.Burkhardt@t-online.de>

Bernhard EICKORN, Romäusring 20, DE-78050 Villingen, fakso: + 49 7721 22074,
<Bernhard.Eickorn@esperanto.de>

Marija BELOŠEVIĆ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, telefono: + 385 1 3745 052, <mbeLOSEV@public.srce.hr>

Atentu la kutimajn informojn en DIA REGNO kaj ESPERO KATOLIKA, kaj krome la informojn daŭre aktualigotajn en: <http://home.t-online.de/home/st-fidelis>.

Ĉiuj aliĝintoj ricevos informbultenon, ĉu rete, ĉu per ordinara poŝto.

La kongesurbo estas trafike bone ligita kun pluraj eŭropaj urboj: ☉ trajne: horaro <http://www.tel.hr/hz> ☉ buse: horaro <http://www.tel.hr/autokol-zg> ☉ aviadile: horaro <http://www.croatiaairlines.hr> ☉ ŝipe ĝis Rijeka kaj daŭrigi per buso aŭ trajno, ŝiphoraro: <http://www.tel.hr/jadrolinija> ☉ informo por ŝoforoj: Kroata aŭtomobilklubo <http://www.hak.hr>.

15-a Ekumena Kongreso

54-a de IKUE 51-a de KELI

14–21 de julio 2001

en Zagreb, Kroatio

Nia temo

'ADORU'

La nova preĝ- kaj kant-libro de IKUE kaj KELI

Ni kongresos kune kun

5-a JET '2001

(5-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro)

samtempe en la sama kongresejo, sed ofte kun aparta programo

En la unua jaro de la 21-a jarcento kaj de la 3-a jarmilo de la kristanismo ni rigardas antaŭen. Ĉi tiu kongreso estos la kongreso de nia portanta fundamento: **Nia Diservo**. Antaŭ ĉio ni volas kune vivi kristane, preĝante por plia progreso de unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo. Por pli bona preĝado ni havos la novan preĝ- kaj kant-libron **ADORU**.

La kongreso okazos en Zagreb tuj antaŭ la UK Zagreb. Samtempe kaj samloke okazas la 5-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro JET '2001.

Oni atentu la **speciale favorajn prezojn por familioj kaj grupoj**. Tio estas la ŝanco, kunveni parencajn aŭ konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia Esperanto-kunveno. Estas antaŭkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam komencis lerni Esperanton. Tion konfirmu antaŭe grup-gvidanto aŭ gepatroj. Dum la kongreso ni donos kurson por komencantoj kun antaŭscioj kaj paroligan kurson.

Ni kore invitas vin aliĝi al nia 15-a Ekumena Kongreso Zagreb 2001

nome de la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI:

Adolf BURKHARDT por KELI **Bernhard EICKORN** por IKUE
kaj nome de la Loka Kongresa Komitato: **Marija BELOŠEVIĆ**

Aliĝilo

sendota al Marija BELOŠEVIĆ, Sveti Duh 130, HK-10000 Zagreb
Familioj kaj grupoj bezonas nur unu aliĝilon. La grup-estro aŭ unu el la gepatroj
kruc-signtu interkrampe kaj metu sian nomon en la nom-linion:

☒ Aliĝo al () la 15-a Ekumena Kongreso, aŭ al () JET'2001 en Zagreb.

Tuta nomo: _____
Bonvolu skribi vian **familian nomon MAJUSKLE** kaj la **personan nomon minuskle**

Adreso: _____

Lando (en Esperanto) _____ telefono: _____

faksnombro: _____ reta adreso: _____

Sekso (signu inter la krampoj): ☒ ina (), ☒ vira ().

Mi deziras dividi la ĉambron kun: _____

Mi/ni planas alveni je (dato kaj horo, se eblas): _____

Mi/ni planas foriri je (dato kaj horo, se eblas): _____

(Nur JET-anoj): La aer-linia distanco de mia logloko al Zagreb ĉ.: _____ km

(Nur, se malpli ol 25-jara je 14.08.2001, notu la naskiĝtagon: _____)

(Familio aŭ grupo): Kun mi venos: _____

(skribu ĉi tie la nomojn
kaj en krampoj la aĝojn
ĝis 25 jaroj)

Loĝado: Legu unue la informojn sur la dekstra folio, duan parton!

☒ Mi/ni mendas ☒ () plur-litan ĉambron en la kongresejo (1-litaj ĉambroj

en la kongresejo nur en eksterordinaraj kazoj kun 30% kotizaltiĝo; skribu aparte

vian kialojn, ekz. manka ir-kapablo, alta aĝo; 2-litaj ĉambroj estas rezervitaj al

geedzoj.)

☒ Ni estas geedzoj kaj petas ☒ () 2-litan ĉambron en la kongresejo.

☒ Mi/ni mendas en la hotelo ILICA ☒ () 1-litan; ☒ () 2-litan ĉambron;

☒ () 2-litan pli grandan ĉambron; ☒ () 3-litan; ☒ () 4-litan apartamenton

en la hotelo JADRAN ☒ () 1-litan; ☒ () 2-litan ĉambron.

☒ Mi/ni NE mendas tranoktadon: ☒ ()

☒ Mi/ni volas resti en la kongresejo ankaŭ dum la UK sen manĝoj: ☒ ()

Manĝoj: ☒ Mi/ni NE volas partopreni la kongresajn manĝojn ☒ ()

☒ Mi/ni petas vegetarajn manĝaĵojn (por kiom da personoj?) _____ ☒ ()

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo (temo, daŭro):

(Atentu, ke en la limigita tempo de la kongreso ne ĉiuj ofertoj povas esti prezentataj)

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.

Pagmaniero: Mi pagis la sumon de _____ je la _____

☒ () al Banka konto Marija Belošević, Zagrebačka banka, Zagreb,

Trg B. Jeličića 15, konto numero 2422034108

☒ () al UEA-konto belo-n



Ĉi paĝon fortondu de la maldekstra aliĝilo, notu ĉi tie por via persona uzo:

☒ Mi aliĝis al ☒ () la 15-a Ekumena Esperanto-Kongreso

aŭ al ☒ () JET'2001, ambaŭ en Zagreb 14-21 de julio 2001.

Mi anoncis kun mi: _____

Ripetu ĉi tie la nomojn

de tiuj personoj, kiujn vi

anoncis kun vi

☒ Mi/ni mendis ☒ () 2-litan ☒ () plur-litan ĉambron en la kongresejo

☒ Mi/ni mendis en la hotelo ILICA ☒ () 1-litan ☒ () 2-litan ĉambron

☒ () 2-litan pli grandan ĉambron; ☒ () 3-litan, ☒ () 4-litan apartamenton

en la hotelo JADRAN ☒ () 1-litan ☒ () 2-litan ĉambron

☒ Mi/ni NE mendis tranoktadon: ☒ ()

☒ Mi/ni volas resti en la kongresejo ankaŭ dum la UK sen manĝoj: ☒ ()

☒ Mi/ni NE volas partopreni la kongresajn manĝaĵojn ☒ ()

☒ Mi/ni deziras vegetarajn manĝaĵojn por _____ personoj ☒ ()

Mi proponis jenajn kontribuojn al la kongresa programo (temo, daŭro):

Mi pagis la sumon de _____ je _____ al _____

Informoj pri la kongresejo kaj hoteloj

En Zagreb ni kongresos en la porsacerdota seminario, strato Voćarska 106, (plej norda parto de la strato), ĉ. 2 km norde de la ĉef-stacidomo, ĉ. 1 km nord-oriente de la urbo-centra katedralo. Ĉambroj, kongresejo kaj manĝejo estas en unu komplekso. Ejoj malnovaj, plenaj de historio. Necesejoj kaj duŝejoj en la koridoroj. Multaj muzikemaj kunvenejoj. Religia, hejmeca etoso. Unu-litaj ĉambroj normale nur en la hoteloj. Proksime de la seminario troviĝas ambulanco, apoteko, ĉiovendejo, gazetvendejo, fruktovendejo. Facile atingebla per buso: ekiro antaŭ la katedralo, 2 haltejoj. La bushaltejo troviĝas 200 m for de la seminario. Dumtage la busoj trafikis plej ofte en intervaloj de 15 minutoj. Unua buso ĉ. 4.45 kaj la lasta ĉ. 23.50.

Se vi deziras pli komfortan loĝadon, ni proponas:

1. la malgrandan privatan hotelon ILICA (adreso: Ilica 102), atingebla per publika buso (2 haltejoj) + tramo (2 haltejoj) tra la centro 2 km for de la kongresejo. Tramhaltejo troviĝas antaŭ la hotelo en la centro, transporto-daŭro ĉ. 7 minutojn. Ĉiu ĉambro estas klimatizata, kun duŝ-neceseja banĉambro, telefono, ret-aliro, televido kun satelita anteno.

2. Alia 3-stela hotelo JADRAN (adreso: Vlashka 50), atingebla per buso (1 haltejo) +tramo (1 haltejo 150 metrojn for de la hotelo), situas 1 km for de la kongresejo en la centro. La ĉambroj estas ekipitaj per banĉambro, televido, telefono.

Ambaŭ hoteloj provizos la tranoktadon kun la matenmanĝo. En la hoteloj eblas resti ankaŭ dum la UK, sed vi devas samtempe mendi tiun servon kun nia kongreso. La hoteloj estas malfermitaj 24-horojn kun propraj parkejoj.

La hotelon ni mendas nome de vi, kaj por atingi 10%-an rabaton vi pagos la hotel-kostojn al la kasisto de la LKK en la kongresejo tuj post la alveno. Al la kongresa kaso antaŭ-pagendas la aliĝ-sumo kaj la kotizoj laŭ n-ro 2.2. (vidu dorsflanke)